



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

PILO-PRESS

sendas salutojn
al ĉiuj espe-
rantistoj okaze
de la Librotago
=====

Edonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113 1
D-85 Nürnberg
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 44/1975 - 10 dec 1975
Aperas ĉiusemajne

A Ĉefurbestro por Esperanto

Weißenburg i.B. (pp) - Sabate, la 6an de decembro, okazis en la nordbavara urbo Weißenburg informkunveno pri Esperanto. La iniciato fakte eliris de la ĉefurbestro de tiu urbo, d-ro Zwanzig, kiu komence de oktobro okaze de la jarkunveno de GEFA en Treuchtlingen informis la publikon pere de la loka gazeto, ke esperantistoj de la angla urbo Chichester serĉas kontaktojn kun esperantistoj el Weißenburg. Bedaŭrinde en tiu urbo ne estas esperantistoj. Kio do estas farenda? Kelkaj germanaj aktivaj esperantistoj konkludis, ke oni do devas krei esperantistojn en tiu urbo.

Estis Joachim Giessner, prezidanto de GEFA, Herzberg, kaj Josef Weidacher, distrikta delegito de GEFA, München, kiuj turnis sin al la urba administracio kun la propono okazigi informkunvenon por la enloĝantoj de Weißenburg. Kun subteno de loka fervojisto, Helmut Osteried, tiu intenco realiĝis.

Krom dudeko da interesuloj la kunvenon ĉeestis la ĉefurbestro de Weißenburg, d-ro Zwanzig, la urba kulturreferento Wolfgang Schöftaler, magistrato por kulturaj aferoj, Schmidt, kaj redaktoro de la loka gazeto "Weißburger Tagblatt", kiu jam antaŭe informis pri la kunveno.

Sino Elfriede Kruse, Frankfurt/M, sekretarino de IFEF, montris interesajn lumbildojn pri sia Esperanto-vojaĝo al Japanio kaj per tio donis konvinkigajn ekzemplojn de la praktika uzo de Esperanto. Joachim Gießner, GEFA- kaj IFEF-prezidanto, parolis pri la ekesto kaj disvastiĝo de Esperanto. Per mallonga provleciono li sukcesis instigi la interesulojn paroli siajn unuajn Esperanto-frazojn.

La ĉefurbestro en mallonga salutparolado deklaris, ke li subtenas la celojn de la Esperanto-movado kaj ke li tre ĝojus, se en Weißenburg troviĝus homoj, kiuj volas lerni Esperanton. Li eĉ promesis, se tio estos necesa, ankaŭ finance subteni Esperanto-kurson. La Esperantogastojn el Frankfurt, Herzberg, Lichtenfels, München kaj Nürnberg la ĉefurbestro invitis enskribiĝi en la gastlibron de la urbo.

Estis interkonsentite kun la urba kulturreferento anonci por komenco de februaro 1976 Esperantokurson, kiun gvidos Ludwig Pickel, Nürnberg.

Ĉi-loke necesas danki al sino Kruse kaj al s-ro Giessner, ke ili faris longan vojaĝon por sukcesigi tiun kunvenon, kio ankaŭ montris ke la germanaj Esperanto-fervojistoj, speciale ilia gvidantaro, apartenas al la rondo de la plej aktivaj esperantistoj en FRG.

Salutojn de prof. T. Nišiumi

Parizo (pp) - Prof. T. Nišiumi, UEA-delegito de Tokio, kiu nuntempe vojaĝas en Eŭropo, informis, ke li estas de la 13a de novembro en Parizo. Meze de decembro li vojaĝos al Lyon kaj suda Francio kaj poste al Hispanio. Post reveno al Parizo meze de januaro 1976 li vojaĝos al norda Germanio, Danlando kaj aliaj skandinaviaj landoj. Meze de februaro li revojaĝos tra Sovetunio al Japanio.

Informado kaj instruado

Daŭrigo de raportoj kaj spertoj de agantoj en FRG

K. Fischer, 8761 Bürgstadt: Rimarkinte ke vi uzas la rezultojn de via enketo ne por iluzia fanfaronado sed por realeca resumo de la nuntempa agado, mi volas kontribui per miaj spertetoj.

Kiel vi scias mi nun gvidas kurseton por ĉ. 15 infaninoj de la "Staatliche Realschule Miltenberg" (ŝtata reallernjo). La plej granda komenca obstaklo estas ne la burokrateco de la lernejo, ne la manko de bonvolo de kursgvidanto, sed la malfacilo havigi al si sufiĉe rapide taŭgan, bonaspektan lernolibron. Oni ja ne povas postuli ke la landa peranto stokhavu dudekon de la plej taŭgaj lernolibroj sur la Esperanta merkato.

Varbadon mi jam de jaroj faras afiŝante de informilojn de "PILO". La intereso por Esperanto estus sufiĉe granda por daŭre havi kursojn. Sed pri la membrigo, tio estas alia demando, malpli facile respondebla, en tiu kampo ankaŭ financa problemo! (Mi mem dum la lastaj jaroj kromprofesie laboris por gajni monon). Ĉiel mi nun volas ampleksigi mian poresperantan laboron ĉi tie. Sed aktivuloj kiuj elspezas sian energion meritus subtenon por varbado, taŭgaj laboriloj ktp. Sed mi sentas, ke tion oni ankoraŭ ne plene komprenis en niaj rondoj.

Generale, oni ne plendu kaj ne cerbumu ĉu Esperanto sukcesos. Nia tasko estas cerbumi kiel disvastigi ĝin. Hieraŭ mi vizitis bibliotekon publikan kaj trovis Esperanto-librojn kaj lernilojn. Laŭdon al la aktivuloj tie. Sed ĉu oni vere kredas ke tradukoj el la germana tre interesas la germanojn, ĉu oni fakte supozas ke lerniloj de la jaroj 1922 kaj 1902 povas atesti la vivantecon de nia lingvo? La verdikto de la publiko estas logika, jam tute ne miriga. Mi klopodos ŝanĝi la staton de la afero donacante belaspektajn librojn el mia propra stoketo. Se nia lingvo en bibliotekoj ne reprezentiga, kie ja svarmas eblaj adeptoj, kie do en alia loko?

Fine nun al la demando supre citita: Ĉu Esperanto sukcesos? Kiel instruisto de la modernaj lingvoj mi scias ke lernado de nacia lingvo ne povas esti la solvo de la problemo, ĉiutage mi tion spertas. Kial do Esperanto ne sukcesis pli ol konate? Ankoraŭ ne sufiĉe da homoj suferas pro la lingvoproblemo por envicigi tiun problemon en la liston de plej urĝaj temoj. La premo de la neceso ne sufiĉe vaste sentiga, afero de tempo! Sed ni faciligus la problemon por ni se ni ne kontentigus nin per tiu konkludo. La neceso estas nur unu parto, la amboso eble, la fero jam ruĝe ardas, ni blovu la fajron por akceli la proceson kaj pretigu nin al ŝvingo de la martelego.

Sincere: Ni esperantistoj estis grandparte senkuraĝaj, kompatindaj ŝafoj kaj tute ne dignaj de nia majstro Zamenhof. Donaĉon ni faru je lia naskiĝtago al li, al ni, al la mondo: Ni agu laŭ la konvinko de nia koro.

Friedrich Volk, Würzburg: Diversaj el niaj grupmembroj persone kontaktis kun interesuloj persone pri Esperanto. Sed realigi Esperanto-kurson ne eblis pro manko de taŭga instruisto, bedaŭrinde. S-ro Otto Gessner, kiu nun studas en Würzburg komencis interesigi kaj varbi interesulojn en sia medio. Sed li ankaŭ spertis pri la kutimaj malfacilaĵoj, kiuj estas: tro granda kvanto de aliaj studfakoj, ordigi la konvenan tempon ktp.

La Würzburga grupo regule kunvenas dufoje en la monato en sia preskaŭ luksa kunvenejo. Sed ni devas konstati, ke la membraro maljuniĝas iom post iom. Se ni ne povos gajni junajn membrojn, ni iros la saman vojon, kiun jam multaj iris pli frue.

E. W. Matthes, Mannheim: Malfacile estas instrui ĉiujn gelernantojn regule dum iu tago de la semajno, ĉar: dommastrino, studento, eksterlandano kaj laboristoj kun alterna labortempo ktp.

Mi informas regule kaj konstante sed ... pro la nerregula apero de EER mi ne kuraĝas varbi novajn membrojn por GEA.

17a Internacia Fervojistista Esperanto-Skisemajno (IFES)

Frankfurt/M (gefa/pp) - De la 8a ĝis la 13a de februaro 1976 okazos en la montara domo de U.E.C. "La Molina" (Gerono) la 17a skisemajno. IFES. La restadejo situas en la kataluna pirenea montaro de Hispanio. La fervojstacio La Molina troviĝas sur la linio Parizo - Barcelono tra la landlimo LA TOUR DE CAROL/PUIGGERDA.

La programo konsistas el diversaj skikonkursoj kun abundaj premioj, lingva konkurso, karnavala vespero, diversaj ludoj kaj aliaj amuzadoj. La skitereno estas same taŭga por spertuloj kiel por komencantoj. La prezo de la restado estas 3 000 pesetoj. Aligfino estas la 1.1.1976

Esperanto en Radio

Vieno. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher de la pasinta elsendo okupis sin i.a. pri la konflikto inter kanceliero Kreisky kaj Simon Wiesenthal, kiu intertempe, almenaŭ por ekstere, estas finita. D-ro Macher konstatis: "Wiesenthal retiris la akuzon pri ofendo de sia honoro, Kreisky deklaris, ke li ne suspektas, ke Wiesenthal servis al la Gestapo. Li, kiu ja mem devenas de juda familio, volis nur malebligi privatan justicon. Ĉar en Aŭstrio nur la juĝistoj decidas ĉu iu estas kulpa aŭ ne."

En la venonta elsendo el Vieno oni povos aŭdi artikolon pri la "Viena Kristnaska Foiro" (13/14-12-1975) Ni citas la komencajn frazojn: "La Viena kristnaska foiro estas jam tre malnova, generacion post generacio da infanoj ĉiam denove ravanta institucio. Sed ĝia ejo, ĝia topografia sceno, ne estas tiel konstanta. La gevoj rakontas, ke in ilia tempo ĝi okazis sur la granda, pitoreske baroka placo "Am Hof"; kaj ekzistas pentraĵoj, kiuj konservas por ni la tiaman aspekton, miksitajn el lumoj kaj ombroj en atmosfero de vigla kristnaska sugesto."

Radio Varsovio. La elsendoj, speciale la radiaj ĵurnaloj, en la lastaj tagoj estis plenaj da informoj kaj komentarioj pri la 7a partia kongreso. - Estas bedaŭrinde, ke la posttagmezaj elsendoj preskaŭ ne estas addeblaj ĉi tie en Nürnberg pro perturboj kaj interferoj de aliaj stacioj. - Interesa ero de la dimanĉa Esperanto-Ekspreso estis la daŭrigo de la intervjuo kun ge-svoj Grattapaglia kaj d-ro Diniz pri BONA ESPERO. Tiu intervjuo helpis doni pli klaran bildon pri tiu interesa iniciato esperantista meze de Brazilo. Cetera kadre de la Esperanto-Ekspreso oni povis ankaŭ aŭdi la rubrikon "Novajoj de Pilo-Press". - En sporta felietono Jerzy Grum denove pravis, ke li estas la kompetenta sporta reportero de la Esperanto-Movado, speciale rilate al futbalo.

Berno. D-ro Arthur Baur rakontis pri interesa nuntempa sviso, kiu speciale konatiĝis kiel kabareisto. Ges-roj Gacond ĉi-foje elektis temon pri neologismoj, ĉerpitan el Literatura Mondo.

Festeto en Nürnberg

Nürnberg (pp) - La esperantistoj de Nürnberg kune kun kelkaj anoj de nuntempa Esperantokurso festis en modesta kadro la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof, merkrede la 10.12.75. Regis vigla agrabla atmosfero!

Pilo-Press: Ĉiusemajna informilo; jara abonkotozito 30 GM
PSch K Nürnberg 819 56-851 Ludwig Pickel, Nürnberg

Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj valoraj objektaj premioj

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

- 1) Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo.
- 2) Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?
- 3) Kiujn virinojn vi konas, kiuj — laŭ via opinio — ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Pollando

— en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso“ —

ĝis la 31-a de decembro 1975 j. (decidas la dato de la posta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonsancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO
Warszawa